# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




1982 · 3 · (91)

# KOVOVÉ
## METALAJ REMIZOJ
# GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado au sur submuro au sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

# INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, au telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.

# Kiu ĉiam stimulas la nuklean konkuron?

Jen demandoj ege gravaj por havigi al ni racian opinion pri la respondeco koncerne nuklean konkuron. Kiu stimulas la nuklean konkuron? La faktoj mem respondas kaj la datoj atestas.

Laŭ la donitaĵoj de la "Internacia Instituto por serĉadoj favore al Paco" /Stockholm International Peace Research Institute" SIPRI/, la nuklea konkuro trapasis la sekvantajn etapojn :

En I945 USONO provis la unuan atoman armilon.

4 jarojn poste Sovetunio finon alportis al tiu monopolo.

En I952 Washington estis la unua por provi varmo-nuklean armilon.

La sekvantan jaron Sovetunio fabrikis nuklean transportilon.

En oktobro I957 Sovetunio lanĉis la unuan artefaritan sateliton. Tion la okcidentaj militspertuloj konsideris kiel salto antaŭen koncernante la kreadon de interkontinentaj armiloj! Tamen, tio estis nur defenda agado. Ĉar tiam USONO estis jam ĉirkaŭinta Sovetunion far aviadilaj bazoj, kiuj ebligis transporti nukleajn armilojn super ĝia teritorio. Sovetianoj ne havis tiujn similajn bazojn.

Ellaborinte atak-projektojn kontraŭ Sovetunio, usonanoj kalkulis kun sia geografia nevundebleco. Do, la interkontinentaj raketoj estis nur respondo celante reekvilibrigi la vid'al vidajn kvantojn!

En I960 movkapabliĝis la unua USONA atom-submarŝipo provizita de balistikaj ilaĵoj.

Nur kvar jarojn poste komencis Sovetunio efektivigi siajn raketlanĉilajn submarŝipojn.

En I970 USONO ekprovizis siajn interkontinentajn balistikajn raketojn per multkapaj nukleaj ogivoj.

Nur en I975 disvolvigis Sovetunio sian similan sistemon.

USONO iniciatadis plejmulton el la strategiaj armilaj sistemoj - rekonis la eksa delegito en UNO s-ro C. Yost.

"Ekde la apero de la nukleaj armiloj USONO antaŭgardadis en la armada konkuro" deklaris la malnova vic-prezidento de USONO W. Mondale!

Oni observas la saman sintenon hodiaŭ : neŭtron-bombojn, kruzad-raketojn, nevideblajn aviadilojn, ĉion-tion la mondo ŝuldas al USONO.

Ni prave asertas : la minaco kontraŭ la paco eldevenas ne de Sovetunio, jes-ja de USONO!!!

El belga numero de PACO

## Kiu respondecas pri la ĉiufoje plia etapo?

# KONSTATOJ DE LA 15a KONSULTIĜO EN EREVAN





La 15a konsultiĝa konferenco de reprezentantoj de E-organizaĵoj el socialismaj ŝtatoj traktis dum internacia situacio certagrade alispeca ol ĝi regis dum la konsultiĝoj antaŭaj. La malboniĝanta internacia situacio tial estis centro de atentemo de ĉiuj pridiskutataj temoj.

Kian gravan signifon al ĝi donis sovetiaj partoprenantoj tion dokumentas ankaŭ la fakto, ke la protektanto estis Tutsovetia societo por amikeco kaj kulturaj kontaktoj kun eksterlandaj ŝtatoj, kies gravsignifaj reprezentantoj kaj el la Centrejo kaj el armenia filio ĉiujn traktadojn partoprenis. La esceptan karakteron de la konferenco substrekis ankaŭ la fakto, ke ĝi estis inaŭgurita per solena prelego de profesoro M. Isajev, doktoro de sciencoj, prezidanto de Asocio de sovetiaj esperantistoj, okaze de 60-jara jubileo de Sovetunio. La prelego, kiu akcentis la signifan gravecon de fondo de la Asocio por multnacia lando, dokumentis ankaŭ tre konvinke la problemaron de internacia politika kaj lingva interkompreniĝo. Tial oni decidis publikigi la prelegon en ĉiuj asociaj presorganoj de socialismaj landoj.

Novaj aspektoj de internacia situacio turnis la atentemon de la reprezentantoj de esper. organizoj je daŭre pli signifa problemaro de porpaca kunlaboro de esperantistoj. Estis konstatita la fakto, ke ĝuste esper. organizoj de socialismaj landoj kapablis engaĝigi en porpaca kunvivo kaj malarmiĝa strebado multe pli sukcese ol ceteraj organizoj jam pro siaj kontaktoj kun aliaj societaj tavoloj kaj grupoj. Oni akcentis ankaŭ gravan rezulton, kiun en la mondo alportas esperantlingvaj aldonoj de la ĵurnalo Moscow News, informantaj pri porpaca iniciativo de Sovetunio. Samcele oni konstatis la sukcesojn, kiujn atingis nia Asocio pro la eldono de "Riporto skribita en la pendumila maŝo" de Julius Fučík, kies E-eldono venis en sferojn de legantoj, kiujn ne tuŝis alilingvaj tradukoj.

Oni ankaŭ akcentis nepran bezonon la porpacan movadon ankoraŭ pli subteni pro atingitaj jam gravaj rezultoj en internacia senco. Similan atentemon dedičis la konferenco ankaŭ al bezono de

internacia kunlaboro enkadre de UEA, ĉar ĝi strikte respektas politikan neŭtralecon, neŭtralecon ja aktivan, kiu rifuzas koloniismon, rasan kaj lingvan diskriminaciojn, respektas porpacan kunlaboron kaj ebligas disvolvon de internacia esper. porpaca organizo MEM kaj ĝian aktivadon ankaŭ sur la tereno de UEA.

Eblas do aserti, ke la 15a konferenco plenumis sian taskon ĉefe pro tio, ke ĝi orientigis la laboron de esperantistoj de socialismaj landoj al aktualaj demandoj, kiuj fontas el samtempa komplika internacia situacio.




15a Konsultiĝo en Jerevano ne estis sole traktadoj. La gastigantoj preparis por partoprenantoj riĉan kulturan kaj turisman programon. Ni vizitis konatajn lokojn - lagon SEVAN, preĝejojn EĈMIADZIN, kie laŭ la legendo surteriĝis la SAVANTO, GARNI, GEHARD, muzeojn de infana arto, etnografian muzeon en SARDARABAT, ni rigardis proksiman monton ARARAT kaj aŭdis pri malfacila siatempa sorto de armena popolo. Tamen feliĉe homoj, kiujn ni vidis, estis ege bonkoraj, kontentaj, amikaj kaj ĉarmaj. Rigardu nur la foton kun esperantistinoj en naciaj kostumoj, kiuj al ni montris dum programo en klubejo emociigajn naciajn dancojn.

## ● ● ● ● Publika letero el Belgio ● ● ● ●

Por indiki la danĝeron, kiu preciziĝas...protestas la regiona Asocio de l'UNUIĜO BELGA POR PACDEFENDO.

Lieĝo, la 4-an de majo 1982

S-ro Wilfried Martens

Unua Ministro
rue de la Loi 16
1000 B r u s e l o

Sinjoro Unua Ministro,

Ni volas sciigi al vi la akran malaprobon al la registaro, kiun vi estras, pro la sentoj provokitaj per la firmaj publikaj deklaroj de la Prezidanto de la Socialista Partio, Karel Van Miert, koncerne la preparadojn instaligi nukleajn raketojn en la ĉirkaŭaĵojn de Florennes.

Ni kredas utile rediri al vi, Sinjoro Unua Ministro, kiom tiu decido kontraŭas la popolan volon, kiu esprimiĝas diversmaniere, nome per la manifestacio de 250 000 en Bruselo, lastan oktobron, per multnombraj opiniaj deklaracioj el urbaj konsilantaroj kaj sindikataj kaj politikaj organizaĵoj.

Ĉu ankaŭ ni devas al vi rememorigi, ke nia regiona asocio kolektis pli ol 25 000 subskribojn kontraŭ la disbazigo de raketoj en Belgio, kaj, ke jam en julio 1980, grava delegacio de sindikataj, politikaj kaj religiaj eminentaj personoj, je la nomo de la subskribintoj, estis akceptita en la Ministerio pri Eksteraj Aferoj.

Anstataŭ peze influi en internaciaj medioj por ke sukcesu la interparoladoj en Genevo, la decido de la Registaro ekirigi la konkretan etapon por instaligi la raketojn en la suda parto de nia lando, fariĝas instigo al la estrantoj de NATO kaj al la milita industria komplekso, kiuj volas prefere antaŭfavorigi la uzon de potenc-aparato, anstataŭ ol tiun de la interparoladoj por malarmado.

Ni postulas de vi, Sinjoro Unua Ministro, ne klarigojn pri la decido koncerne Florennes, sed formalan provon, ke la registaro rezignis tiujn preparadojn.

Ni ĝentile salutas vin, Sinjoro Unua Ministro.

La sekretario:
René K l u t z,
Eksa Provinca Konsilanto

La prezidantino:
Louise P a q u e t-Hollange,
Honora Skabeno de Lieĝo.

## el leterkesto

Hanojo 15-04-'82

Estimataj geonkloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Ni estas gelernantoj de la 6a klaso en la lernejo Ngô Si Lien. Pere de VPEA delegacio ni sendas al vi, niaj geonkloj, niajn elkorajn salutojn.
Dank' al la patronado de ĈEA ni povas lerni Esperanton kaj povas korespondi kun la ĉeĥaj, slovakaj kaj aliaj gekolegoj. Nia Esp. kurso funkcias dufoje en ĉiu semajno kaj havas 20 gekursanojn.

En la nomo de vjetnamaj gelernantoj de Ngô Si Lien lernejo ni sendas al vi niajn plej sincerajn dankesprimojn kaj deziras al vi bonan sanon, feliĉon, novajn sukcesojn en via nobla agado.

Viaj genepoj
TRAN PHUONG MAI



VIZITU B U L G A R I O N PERE DE Ĉ E A

Internacia Esperanto - Kursejo

Programo 1982:

SMOLJAN /PISANICA/ - dusemajnaj kursoj: septembro 1-14, 16-29; oktobro 1-14, 16-29; decembro 1-14, 15-28.

Dektaga kurso: aŭgusto 1-10.

Dudektaga kurso: aŭgusto 11-30.

Prezoj laŭ kategorioj en Kĉs vidu sube :

Por dusemajnaj:kat"A"/ĉambro kun 2 litoj/kat."B /kun 3-4 litoj/kat"C"/kun 6-8 litoj/.

Por dektaga:kategorio"A"/kun 2 litoj/kat"B"/kun 3-4 litoj/ " C"/kun 6-8 litoj/.

Por dudektaga:kategorio"A"/kun 2 litoj/kat"B"/kun 3-4 litoj/kat"C"/kun 6-8 litoj/.

En la programo: kvar lernohoroj potage, vizito al Smoljan kaj planedario, al Pamporovo kaj veturo per lifto al la supro "Sneĵanka", al vilaĝo Mogilica, al la Trigrad-intermonto kaj al la groto "Gorĝo de la diablo", aliaj ekskursoj, sportludoj, diskoteko, diafilmoj, gajaj vesperoj, prelegoj k.a.

Renkonte al la Novjaro 1983:

La 29-an de decembro 1982 - la 2-an de januaro 1983.

Prezoj enKĉs:Kat"A" /ĉambro kun 2 litoj/kat"B/kun 3-4 litoj kat"C"/kun 6-8 litoj/.

En la programo: novjara balo, vizito al Smoljan kaj planedario, al Pamporovo kaj veturo per lifto al la supro "Sneĵanka".

VARNA /ORAJ SABLOJ/

Dusemajnaj kursoj: septembro 1-14, 16-29; oktobro 1-14, 16-29.

Prezoj en Kĉs : oktobro 2.150,-- /ĉambro kun 2 litoj/ kaj 1.680,--/3 litoj; septembro 2.450,-- /kun 2 litoj/ kaj 2.100,-- /3 litoj/.

En la programo: tri lernohoroj potage, plaĝo, vizito al Varna, Balcik, Tolbuhin, aliaj ekskursoj, sportludoj, diskoteko, diafilmoj, gajaj vesperoj, prelegoj k.a.

| Prezoj por SMOLJAN : | kat. "A" | kat. "B" | kat. "C" |
|---|---|---|---|
| dusemajna restado | 2.050,- | 1.750,-- | 1.550,-- |
| dektaga restado | 1.550,- | 1.300,- | 1.080,-- |
| dudektaga restado | 2.950,- | 2.550,- | 2.100,-- |

La prezoj ne enhavas vojaĝkostojn kaj poŝmonon!! Ni ankaŭ ne okupiĝas pri la vojaĝbiletoj.

# INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO

En aŭgusto 1981 estis malfermita en Bulgario en Meza Rodopi-Montaro Internacia Esperanto-kursejo en vilaĝo Pisanica, kies dometoj estas dissemitaj sur la krutaj altaĵoj. Super la vilaĝaj domoj leviĝas la alta neĝ-blanka konstruaĵo de Esperanto-palaco, konstruita en alpeca stilo. En ĝi troviĝas 60 du-, tri-kaj kvarlitaj dormĉambroj kun tualetejo kaj duŝo kaj 4 apartementoj kun ĉiuj oportunaĵoj. Krom loĝeblecoj troviĝas tie helaj klasĉambroj, aŭdkabineto kun ekipaĵoj por 20 personoj, elegantaj antaŭsalonetoj kun televidilo en ĉiu etaĝo, granda manĝejo kaj diskobaro, kie oni povis vespere danci kaj amuziĝi. Super la domo lumas verda stelo. La kursejo funkcias tutan jaron kaj ĝia kapacito estas 220 personoj.

Jam de siaj gimnaziaj jaroj havis s-ano Jordan Jordanov ideon konstrui en tiu ĉi loko Esperanto-palacon. Dank' al lia oferemo kaj sindona laboro efektiviĝis en Pisanica belega Esperanto-instru-centro kaj vera Esperanto-hejmo. Konstrulaboroj daŭris de 1976 - 1979 j. Helpis esperantistoj precipe el 15 rondetoj el Smoljan-distrikto. La kursojn partoprenis 3 gekursanoj el Ĉeĥoslovakio: unu en IIIa grado kaj du en metodika kurso por Esperanto-instruantoj.

Dum la 20-taga restado est s aranĝitaj diversaj programeroj: vizito al la distrikta urbo Smoljan kaj ĝia planedario kun esperanta prelego, la tradicia folklora festivalo Roĝen-herbejoj '81, busekskursoj al la internacie konata monto - ripozloko Pamporovo. Oni vizitis etnografian rezervejon Široka Láka, ankaŭ Diablan Gorĝon kaj rokojn de Trigrad kaj kelkajn aliajn lokojn laŭ propra elekto. Krom tio la gekursanoj promenadis en ĉirkaŭaĵo de Pisanica, kie troviĝis sovaĝe kreskantaj arbustoj kun abundaj diverskoloraj dolĉaj mirabeloj, kaj sunbruniĝis sur apudaj verdaj herbejoj.

Pisanica estas ideala loko por studado - trankvila - oni aŭdas nur birdan kantadon kaj sonorilojn de ŝafaroj.

-erk-



## Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA

Redaktas: V. Novobilský, Školní 5, CS-400 01 Ústí nad Labem

Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko. SAEST '82 okazos en České Budějovice 1982-08-13/15 /detalajn informojn vidu en la antaŭaj numeroj de Starto/. La partoprenantoj aŭskultos 16 prelegojn, kiuj rilatas al la seminaria ĉef-temo "Energio - la tutmonda problemo" /kvar pliaj prelegoj estas anoncitaj/ kaj 4 prelegojn, kiuj rilatas al problemaro de la fakaj lingvo kaj traduko.

Novaj interesatoj pri SAEST '82 bv. aliĝi rekte ĉe Jiří Patera, Na usedlosti 1534, 147 00 Praha-Krč, kiu senprokraste informos vin, ĉu via aliĝo estas ankoraŭ akceptebla.

En la kromseminaria programo povos la partoprenontoj viziti la lokan paperfabrikon aŭ ekskursi al monto Kleť /astronomia observatorio/.

La partoprenontoj ricevos senpage broŝuron "Energio", kiun disponigis Federacio de Esperanto-organizaĵoj en Nederlando kaj specialan numeron de la gazeto "La Progreso".

\- - -

Laŭ la instrukcioj de ĈEA preparas la komitato de STS laborplanojn por la jaro 1983 kaj por la venonta 5-jara periodo. Sekretario de la sekcio /J. Laube, Alej RA 811, 41300 Roudnice n.L./ atendas viajn proponojn por la plano. Ambaŭ planoj estos prezentitaj al STS-membroj okaze de SAEST '82 en České Budějovice.

\- - -

Obrazový slovník /pasivní součástky pro elektroniku/ jam aperis!

La Bildvortaron /pasivaj eroj por elektroniko/ eldonis la uzina filio de Ĉeĥoslovaka scienca-teĥnika societo en Tesla Lanškroun en kvanto de 250 provekzempleroj. La naŭlingva vortaro enhavas ankaŭ Esperantan version, kiun prizorgis F. Hort /Palackého 764, 563 01 Lanškroun/, faka redaktoro de la Bildvortaro. La sama eldonanto preparas eldonon de pli ampleksa bildvortaro /ĉ. 2000 terminoj/ en proksima estonto.

\- - -

"Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj" /J. Rybář/ en amplekso de 48 manuskriptaj paĝoj estis post redakta finpretigo /J. Werner/ transdonita al ĈEA por eldono.

\- - -

Legu kaj abonu BUDAPEŜTAN INFORMILON, kiu per sia ampleksa SCIENCA RUBRIKO liveros al vi freŝajn informojn pri la apliko de Esperanto en sciencoj kaj fakoj.

\- - -

## Zakládáme sekci mládeže

Na IV. sjezdu ČES v Pardubicích bylo rozhodnuto, že dosavadní sedmičlenná komise mládeže /což byl orgán jmenovaný vedením svazu/ bude zrušena a nahrazena sekcí mládeže. Sekce poskytne prostor k práci většímu počtu mladých esperantistů. Přihlásit se do sekce bude moci každý mladý člen svazu, který bude souhlasit se stanovami sekce a podílet se na jejích úkolech.

Hlavními úkoly sekce bude zvyšování aktivity mládeže, její jazykové úrovně, výchova učitelů a organizátorů pro LET Lančov, příprava ke svazovým zkouškám, výchova budoucích funkcionářů esp. hnutí, organizování brigád, setkání a seminářů, spolupráce s TEJO, s ostatními sekcemi a komisemi apod.

Členové dosavadní komise mládeže vytvořili přípravný výbor sekce, který v současné době zpracovává návrhy statutu sekce.

## Ustavující konference sekce mládeže

Ve dnech 8.-10. října 1982 se uskuteční v hotelu Tálský mlýn ve Žďáru nad Sázavou ustavující konference sekce mládeže ČES. Každá místní skupina může poslat na konferenci j e d n o h o delegáta, zástupce své mládeže. Kromě delegátů se mohou přihlásit i další zájemci mladší 34 let. Přihlášky budou k dispozici na adrese: MUDr. Vladimír Š k o d a, poliklinika 68501 Bučovice. Delegáti místních skupin si nechají na přihlášce potvrdit podpisem předsedy a razítkem MS, že byli zvoleni za delegáty.

Delegáti mají pochopitelně přednost, proto ostatní zájemci budou přijímáni jen do zaplnění lůžkové kapacity hotelu. Žádáme místní skupiny, aby své delegáty nahlásily co nejdříve.

## INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTO-TEATROJ

/Budapeŝto, 1982 19.-28. 3./



La Esperanta Kulturo havis gravan feston inter la 19a kaj 28a de marto 1982 en Budapeŝto, kie okazis Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj kun entute dek du teatraj prezentadoj de aktoroj el Francio, Hungario, Pollando kaj Sovetio.

Tiun ĉi renkontiĝon iniciatis kaj financis Hungarlanda Turisma Oficejo konforme al la rekomendoj, kiujn akceptis la Monda Konferenco de Turismo, okazinta antaŭ tri jaroj en Manilo.

Pro lokomanko ni citu la citaĵon el luksa kajero, kiun eldonis Hungarlanda Turisma Oficejo pri la Budapeŝta Printempa Festivalo '83: "Komprenebla ni ripetos venontjare la plej sukcesajn arangojn, kiel la Internacian Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj...". Se estos vere tiel, hungaraj - kaj alvenontaj eksterlandaj - spektantoj povos vidi ankaŭ tiujn teatrojn, kiuj ĉi-jare ne povis esti invititaj, kaj la Esperanta kulturo denove fariĝos pli riĉa.



## ni recenzas

KONSULTLIBRO pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj, kun resumoj en ses lingvoj. - Marinko Gjivoje, Zagreb, 1980, 56 p., 20x14 cm, prezo ne indikita.

Unuafoje en la historio de Esperanto aperis verko, en kiu oni trovas superrigardon pri Esperanto-kolektoj en publikaj, asociaj, societaj kaj privataj bibliotekoj en la mondo; same pri Esperanto-muzeoj, havantaj ankaŭ riĉan kolekton de Esperanta literaturo.

En la fako "La listo de 30 plej grandaj /t.e. minimume 1000 libroj aŭ 10 metroj de bretlongo/ Esperanto-bibliotekoj en la mondo", subfako "Asociaj kaj societaj bibliotekoj", la unuajn kvin lokojn okupas: 1/ BEA, Londono /30 000 eroj, inkl.broŝurojn, jarkolektojn k.s.; el tio 11 000 libroj/, 2/ "Hodler" /UEA, Rotterdamo/, 3/ Esperanto-Societo /t.e. Esp.Klubo/ Praha kun"proks. 6 100 libroj, broŝuroj kaj binditaj jarkolektoj de E.-gazetoj sur 85 metroj de bretlongo", 4/ Biblioteko de "El Popola Ĉinio", Pekino, 5/ Fondumo Esperanto, Finnlando. Sekvas Tokio, Stokholmo, Malmö, Zagreb,Varsovio, Buenos Aires. El la p r i v a t a j bibliotekoj la plej grandaj estas: Esperanto-Muzeo de L. Hernandez en Yzal, Hisp., P. Neergaard /Dan./ M. Gjivoje /Jug./, W. Auld /Skot., kun 2091 titoloj/,D. Blanke /Berlino/ estas sur la 8a loko /1800 titoloj, 21 m de metrolongo.

En laŭlanda listo, sub Ĉeĥoslovakio" estas pritraktataj /jam kun detaloj/ la EK-Biblioteko Jaroslav Šustr en Praha, EK-bibl. en Brno /proks. 1500 volumoj/ kaj la Ŝtataj sciencaj bibliotekoj en Brno kaj Olomouc. Por sia privata bezono Zdeněk Hršel el Brno kolektis bibliotekon kun 16-metra longo, el kio 8 metroj da gazetoj. - En aldono ni sciiĝas, ke la Vzorná knihovna v Olomouci posedas 321 Esp.-volumojn. - Ĉe la publikaj bibliotekoj troviĝas indikoj pri deĵorhoroj, sistemo de katalogoj k.a.

La plej grandan bibliotekon entute posedas la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno /IEMW/: 17 721 libroj kaj 52 641 aliaj eroj.
La libro de Gjivoje estas verko pionira, tre bezonata kaj praktike utila.

J. Mařík

ESPERANTO. Ni kantas. Eld. Centra Laborrondo Esperanto, Berlin, 1980. 58 p., 20 x 14 cm; kun muziknotoj. La broŝuro enhavas: batalkantojn, germanajn kaj internaciajn popolkantojn kaj diverstemajn kantojn, sume 49. Enestas unu nia popola: Dancu, dancu, turnu vin /trad. T. Pumpr/. Bona papero, bona preso. Nova, bonvena donaco por kantemuloj. Mendebla ĉe ĈEA, prezo Kčs 15.

/jm/

Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo. Oostende /Belgio/, 3-a ĝis-datiga eldono, jan.1982, 14 p., 21 x 15. Listo, kompilita kaj eldonita de Germain P i r l o t , de la universitatoj kaj samrangaj institutoj, en kiuj Esperanto estas oficiale instruata. Samtempe informoj pri la ŝtataj leĝoj kaj dekretoj obligantaj tiun instruadon. Kun antaŭparolo de Michel Duc Goninaz /Universitato de Provenco/. Indikoj pri 15 ŝtatoj. Krome ĉapitroj pri "E.- kursoj ne-konfirmitaj" kaj "Eksperimente funkciantaj".
Utila konsultilo /reeldonota en 1984/.- En la "ne-konfirmitaj" estas forstrekenda la "Husova fakultato en Praha-Dejvice" /post la emeritiĝo de d-ro R. Horský la kursoj tie ne okazas/.

J. Mařík

Jordan Jovkov. Bibliografio. Sofio 1980. Eld. Esperanto-Societo "Paco", Tolbuhin, Bulgario. 23 pĝ. Prezo ne montrita.
La broŝuro enhavas artikolojn "La mondo de J. Jovkov" /P. Dinekov/, "J. Jovkov ĉiam nuntempa en Dobruĝa" /J. Daĉev/ kaj "J. Jovkov en Esperanto" /K. Karucin/. Sekvas bibliografio, kiu listas a/ verkojn de la bulgara verkisto-humanisto J. Jovkov tradukitajn en Esperanto, b/ Esperantajn verkojn pri J. Jovkov. Ambaŭ bibliografiojn kompilis K. Karucin.

VN

Ni kondolencas al LG en Otrokovice kaj al familio de Františka MARTUŠOVÁ, kiu mortis en aprilo 1982. M.Martušová estis fervora esperantistino kaj longjara nia membro.

MARINKO GJIVOJE -
estara esperantisto, publicisto, verkisto, bibliografo kaj arkeologo forpasis 31.5.1982. Eventualajn kondolencojn direktu al Familio Gjivoje, P.p. 5025, 41040 ZAGREB Dubrava, Jugosl.


POR MODERNA SOMERA
VESTIĜO DOMO DE MODO
Dunaj DOM MÓDY BRATISLAVA
POR VIA KOMFORTO UTILIGU
ALSENDAN SERVON !

## Sdělení pro všechny

Předsednictvo Českého esperantského svazu upozorňuje, že železničářská sekce svazu, společně se stejnou sekcí Zväzu esperantistov SSR připravuje ustavení koordinačního výboru v rámci obou svazu. Tento výbor, podle dohodu s IFEF, bude rovněž v budoucnu jediným reprezentantem našeho železničářského esperantského hnutí a společně s touto zahraniční organizací bude spolupracovat i na možnosti oficielního ustavení zemské sekce IFEF, anebo možností stát se přímým členem IFEF.
Protože se v poslední době opět rozmohla " iniciativa" několika osob z nichž někteří ani nejsou členy našeho svazu v tom směru, že obtěžují naše železničáře nejrůznějšími návrhy, svoláváním různých aktivů a schůzí sdělujeme, že jde o činnost zcela soukromou s níž nechce mít nic společného ani vedení našich svazů, vedení IFEF a rovněž ani výbor železničářské sekce. Pro podobnou, nelegální činnost dostal již jeden z nich prokurátorskou výstrahu a je možné, že v době kdy tyto řádky čtete jsou opatření proti takovému matení lidí a" organizačnímu talentu" podstatně účinnější. Proto vám doporučujeme nereagovat na jejich eventuelní dopisy, které samy o sobě deklarují o jaké lidi se jedná.

- kýz -

Komise pro tisk a propagaci Českého esperantského svazu vám sděluje, že připravuje specielní seznam všech klubů a jejich schůzek a především vašich programů. Tento seznam by mohl být zveřejněn jako příloha ve Starto č.6/82 a pro vás by byl vodítkem jak a kam se vypravit v roce 1983. Žádáme vás proto, abyste své náměty, data a jiné informace zaslali přímo osobě k tomu pověřené a sice Stanislavu LINHARTOVI, Esp.klub, místní skupina ČES, Kulturní dům Dukla, 530 02 PARDUBICE.

-ktp-



Josef RUMLER

sesdekjara

Poeto, literatura kritikisto, redaktoro kaj tradukinto el la pola, membro de Asocio de ĉeĥaj verkistoj apartenas al senlacaj aktivuloj de literaturarta sekcio de ĈEA kaj estas bone konata al vizitantoj de pragaj vesperoj - renkontoj kun famaj ĉeĥaj literaturistoj - favorantoj al Esperanto, kiuj li inaŭguras per siaj spertulaj enkondukoj.
Liaj prelegoj kaj esperantologiaj eseoj estas eldonitaj libroforme. La 20an de julio li festis sian rondan vivojubileon. Ni deziras al li firman sanon kaj precipe multe da tempo por plua verkado kaj ĉeĥliteraturo kaj poresperanta.

# KDS

## Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR

Eksportas MERKURIA Praha

# NIA KONKURSO
## 10x RESPONDU

En numero 2/82 ni anoncis, ke nenia respondo al nia konkurso 10 foje respondu el n-ro 1/81 venis bona. Tamen, post la termino por akcepto de respondoj venis el eksterlando kelkaj kaj ĝustaj. Pro la sufiĉe longa vojo de nia gazeto al eksterlandaj legendoj ni decidis nun atendi je ĉiuj. Do ĉitie vi nun ne legos la rezulton el n-ro 2/82. Ĝi aperos en n-ro 4/82. Tamen ni anoncas pluajn 10 demandojn kaj vi bone kaj atente ilin legu.

1. Kiel nomis la unua sekretario de Ĉeĥa Esperanto Asocio? / respondu nomon kaj antaŭnomon/.
2. Kiom da subskriboj havis tiu peticio por UNO, kiun iniciatis UEA en 1952 pri rekono de Esperanto?
3. Kie kaj kiam estis unue eldonita PM kun E-o teksto ?
4. Skribu adreson de sidejo de UEA ?
5. Kiam ekfunkciis ILERA / Internacia Ligo de esperantistoj - radioamatoroj / ?
6. De kiam funkcias MEM ?
7. En kiu jaro estis organizita Komerca kaj Turisma E-o Konferenco kaj en kia urbo ?
8. Konstatu la konstatajn sekciojn de ĈEA / skribu iliajn precizajn nomojn- titolojn /?
9. Kiu akiris la titolon " patro de E-o poezio" ?
10. En kiu jaro estis fondita Klubo de Esperantistoj en Praha ?

Viajn respondojn vi rajtas sendi ĝis 30.8.1982.

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

Esperanto en Ĉeĥoslovaka radio

La 15an de aprilo '82 je la 17a horo - mallongaj ondoj 49 m elsendis Ĉeĥoslovaka radio pli ol 10minutan interparolon kun fama Ĉeĥa aŭtorino kaj merita artistino Miroslava Tomanová, aktorino Eva Seemannová, kiu krom tio legis verk-fragmenton de Tomanová tradukitan en Esperanton, literatura kritikisto kaj verkisto Josef Rumler kaj poetino Eli Urbanová. La dialogon destinitan por ĉeĥoj kaj slovakoj vivantaj en eksterlando gvidis redaktorino de Ĉeĥoslovaka radio Evelína Himalová, kiu surbendigis ĝin okaze de la vespero dediĉita al Tomanová kaj organizita de Arta sekcio de ĈEA.

Urb

## Esperanto en gazetoj

En la lastaj monatoj aperis ampleksaj artikoloj pri Esperanto. Kiel plej aktiva informanto montris sin poeto Jiří Karen. Post la jam menciita Průboj /KPČ, Ústí n.L./ sekvis "Mladý svět" /n-ro 50/1981/ kun tutpaĝa intervjuo kaj poste la faka trimonata revuo literatura "Výběr z nejzajímavějších knih", n-ro 1/1982, kun dupaĝa grava intervjuo pri "Esperanto kaj la literaturo - kulturpolitika faktoro de la nuntempo", kiu konigas la ĉefajn atingojn en tiu fako. Enestas fotoj de tri ĈEA-eldonaĵoj. "Mladý svět" enpresis en januaro 1982 sufiĉe longan kompletigan respondon de nia J. Patera.-La slovaka semajna revuo "Život" n-ro 11/1982 aperigis tutpaĝan stilviglan intervjuon kun Pavel Rosa, honora prezidanto de AESSR /kun lia foto/.-La partia organo Rudé právo /Ruĝa pravo/ alportis 11.02.1982 longan artikolon "Instruisto de nevidantoj" - pri porblindula laboro de nia honora membro Vuk Echtner, kreinto de i.a. 47 diverslingvaj prilingvaj lernolibroj por blinduloj /i.a. por Nederlando/. "Vere giganta verko de homeco en la plej vasta vortosenco", konstatas la redakcio. "Sever", /Ústí n.L./ raportis 09.02.'82 sub "Esperanto signifas homo esperanta" pri jubileo de E., pri la E-Asocioj en ĈSSR kaj pri la ekzemplodona aktivado de la Esperanto - Rondo ĉe Sindikata kulturdomo. - "Svobodné slovo" dediĉis 08.02.'82 al la plumo de K. Kýr kvaronpaĝon okaze de la vivojubileo de nia poetino Eli Urbanová. Kaj la legantoj de la revuo "Naše rodina"/n-ro 12/1982/ aciiĝis el kontribuaĵo de William Auld /reeho je priskota artikolo/, kia fakte estas la vero pri la t. n. skota ŝparemo, kiu ne kongruas kun la legendo.

/JaMa/

## Poŝta stampo

La poŝto Leipzig en GDR uzis en decembro 1981 specialan stampon "15 Dezember. Tag des Esperanto-Buches" /Tago de E-a libro/, sur oficiala koresponda karto "Tago de la Esperanto-Libro 1981", kun faksimilo de la "Libro de Kantoj de H. Heine - 1911". Simile en la tagoj 12-14.03.'82 sur speciala koresponda karto okaze de IFER '82 aperis en Leipzig speciala stampo "Leipzig 1 - Goethe - Faust - Leipzig , Esperanto-Messetreffen". - Okaze de la 34a IFEF-kongreso en Balatonfüred /2-[illegible].05.'82/estis uzata vere plaĉa fervojisttema karto kun insigno de IFEF, enpresita plurkolora 1 forinta E-poŝtmarko /surskribo sur ĝi:34a Esperanto-kongreso de IFEF-Magyar Posta/ kaj speciala stampo dulingva

/jm/

## Sukcesa IFER '82 - anonco pri IFER '83

150 esperantistoj el 9 landoj travivis inter 12a kaj 14a de marto 1982 riĉan programon de IFER '82 en Leipzig /GDR/. Sciencaj kaj ĉeftemaj prelegoj pri Goethe kaj ties Faust, moritataj kantoj, fakkunvenoj, traurba ĉiceronado, muziko kaj danco alternis. Vere internacia vivo pulsis en la salonoj.

Jam nun estas konataj la plej gravaj datumoj pri IFER '83 : Dum la tagoj 11a - 13a de marto 1983 ĝi okazos en Leipzig. La kotizo de 110 M /por fruaj anoncontoj/ inkluzivas 2 tranoktojn kaj tri manĝojn. La ĉeftemo estos ligata al G. Dimitrov. Aliĝi-

lojn kaj detalajn informojn petu de la adreso: Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de IFER, Käthe-Kollwitz-Str.115, DDR-7010 Leipzig.

Unika fotoalbumo pri nia 4a kongreso

Kiu partoprenis memoras, kiu ne partoprenis povas bedaŭri - tamen ĉiuj ĝojos vidante nian fotoalbumon kun 50 fotoj kaj kun ĉefaj kongresaj dokumentoj. Preso sur kreta papero. Prezo modera - nur 10 Kčs. Kiu ankoraŭ interesiĝas, tiu ĝin mendu ĉe nia asocio. Same vi povas mendi la librojn, kiuj estas anoncitaj en la albumo.

Reprezentantoj de nia asocio traktis kun kelkaj esperantistaj organizoj, inter ili kun la vicprezidanto de Litova filio de ASE d-ro Jegorovas, kiu libertempis en nia lando. Temoj estis diversaj: disvastigo de niaj libroj pere de oficialaj vendorganizaĵoj, eblaj reciprokaj personaj kontaktoj aŭ interŝanĝaj klubaj kontaktoj de ambaŭ landoj ktp. Oni nur esperu, ke la komencitaj traktadoj estos rezultodonaj. Jam nun povas al ni skribi tiuj kluboj, kiuj volus korespondi kun E.-kluboj en Litovio aŭ homoj, kiuj pretas reciproke gastigi esperantistojn.

A l i a  t r a k t a d o estis kun la reprezentantoj de Belga E-o asocio, kies 4-membra delegitaro partoprenis dum 21.-23.05.'82 Kunvenon kaj konferencon de Pacdefendantoj en Pardubice. La delegitaro estis gasto de nia asocio. Ni interŝanĝis opiniojn pri ebla pli intima kunlaboro. Ankaŭ ĉi-kaze ni esperas je fruktodona estonta kunlaboro.

Ankaŭ kun A E S S R traktis la 21.-22.05 niaj prezidanto kaj sekretario okaze de Printempa E-o feriado en Tatry. Celo de traktadoj estis kunligi niajn fortojn en ĉiuj eblaj sferoj. Oni parolis ankaŭ pri la kunlaboro de niaj CKj kaj de sekcioj, pri eventuala estonta eldonado de iaj komunaj presaĵoj - ekz. komuna presorgano ktp. Tio certe povas alporti plifortigon de niaj eblecoj kaj ankaŭ montri nian pretecon federaligi la movadon. Ja, estas konata la proverbo "En unuiĝo estas forto". Ni esperas, ke ĉiuj niaj membroj subtenos tiujn liniojn kaj ke ankaŭ slovakaj esperantistoj komprenos, ke tio povas nur helpi al ili.




Medicinistoj, ruĝkrucanoj kaj ceteraj interesuloj ĉu vi jam sciaS, ke nia asocio presis /kun permeso de aŭtoroj kaj UMEA/ kompletan medicinistan terminaron? Vi povas ĝin mendi ĉe nia Asocio. La prezo estas Kčs 19,- kaj sendkostoj. Eldonkvanto nur 1000 ekz., do ne hezitu!

Kompleta katalogo de prelegoj dum SAEST '82 pri energio kiel problemo de homaro. Vi povas mendi ce nia asocio. La seminario pri sama temo okazis en České Budějovice /vidu Starto 1,2/'82/. La katalogo estas interesa ne sole por fakuloj-ĝi estas dokumento pri kapableco prelegi kaj diskuti en E-o ankaŭ pri tiuj specifaj temoj.

La broŝuro enhavas 100 paĝojn kun interesaj desegnaĵoj /grafoj/ kaj grafikaĵoj. Grafike aranĝis G. Klement. Prezo Kčs 29,- aŭ 10 gld kaj sendkostoj.

KOOPERATIVOJ kaj ESPERANTO ?

"Rákoczi Kerdoskút" kaj"Dukla Vracov " estas nomoj de hungara kaj ĉeĥa agrokulturaj kooperativoj. Fine de aprilo ĉi-jare pasigis 5 vracovanoj en kooperativa ripozloko Hárkany en suda Hungario. Dum tiu tempo tempo konatiĝis kun laboro de siaj kolegoj, interŝanĝis spertojn. Ambaŭ kooperativoj laboras en similaj sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj. Nun venos " kerdoskútanoj" en Vracov. Tiu ĉi kunlaboro, pri kiu interesiĝas preskaŭ ĉiuj en ambaŭ kooperativoj eblas nur danke al Esperanto kaj esperantistoj en ambaŭ lokoj.



VINO, FOIROJ kaj ESPERANTO ?

En ĉarma sudbohemia urbeto VALTICE jam tradicie estas organizataj foiroj de la ĉeĥoslovakaj vinoj. Tiu ĉi jare en majo, en nova formo, jam estis po dekses-e. Sciencteĥnika societo en nia respubliko, kadre de ĉi tiu aranĝo preparis internacian seminarion pri vino kaj vito. Prelegis fakuloj el Svislando, Sovetunio. FRG, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio. Venontjare, dum samaj foiroj en Valtice estas organizantoj pretaj akcepti eksterlandajn prelegantojn ankaŭ en Esperanto !!! Do kiu volas partopreni kaj samtempe konatiĝi kun niaj vinoj petu detalajn informojn ĉe Ing. František HAVLÍK, Herbenova 1, CS 695 01 Hodonín.

# RONDETA VIVO

PODĚBRADY - 27-04 okazis en Lázeňská kavárna /Baneja kafejo/ en la parko de Fučík programo kun la poeto Jiří Karen. Ĝin aranĝis Kultura centro de Ĉeĥoslovakaj ŝtataj banejoj kunlabore kun la loka grupo de ĈEA. La partoprenantoj estis plejparte la banejaj gastoj kaj kelkaj esperantistoj el Poděbrady kaj Kolín. La programo estis altnivela. Jiří Karen dum ĝi eksplikis kiel oni la poemojn kreas kaj kiuj sentoj lin je tiu kreado gvidas. Kelkajn siajn poemojn la poeto mem recitis. La gastoj disiris kortuŝitaj kaj kontentaj. Ili es-

primadis deziron,ke da similaj interparoladoj estu pli multe.

J.Skr.

ÚSTÍ nad Labem - En la maja monatkunveno la 13.05. estis sur la programo rememorigo pri la gloraj majotagoj,pri la 1-a, la 5-a kaj 9-a de majo, pri la tagoj kiam la tutmonda laborularo festas sian internacian festotagon, la ĉeĥoslovaka popolo la pragan ekribelon kontraŭ la hitlera faŝismo kaj la gloran liberigon far la soveta armeo. La rememoron kompletigis kontraŭmilitaj poemoj.Kiel gasto parolis s-anino Angela Bode el GDR.

JK

BRNO - la 11.05.estis aranĝita vespero kun poeto Jiří Karen kaj kun amasa partopreno de la membraro. Post prelego inicianta la partoprenantojn en la poezian kreadon legis J. Karen fragmentojn el sia plej nova poemaro "Arboj venas urben",ardaj poemoj je beleco de arboj kaj por ilia protektado. Intertempe estis prezentitaj kantoj kaj poemoj de R. Burns el disko kun recitado de W. Auld kaj belegaj kantoj de la angla kantistino Margareta Hill.

HAVÍŘOV - Ĉiumonate estas organizataj prelegoj.En februaro prelegis Fr.Strumínský pri sia vojaĝo en Francio, en aprilo J. Pastrnáková pri Aŭstrio. La 11-an de marto oni festis la Internacian tagon de virinoj kun prelego pri Italio.Prelegojn akompanas diabildoj.

ASt.

MĚLNÍK - lasta antaŭvakanca kunveno "En spuroj de niaj busekskursoj"surfilme de nia membro K. Lojka la 22-05-altiris plurajn membrojn en-kaj eksterurbajn,i.a ankaŭ el Roudnice n.L.,Liblice k c. Ni ree vizitis Aŭstrion,Jugoslavion,Polujon,GDR,Hungarion.

-jelč-

OLOMOUC - Solena antaŭtagmezo je la 50-jara jubileo de plantita Esperanto-arbo okazis sabate la 19-an de junio je la 10-a horo en salono de Dr.Václavek. Aranĝis elstara instituciο Vlastivědná společnost muzejní, en kiu parto de esperantistoj el loka grupo ekfunkciis kiel "laborgrupo por historio de internacia lingvo E. en Olomouc kaj ĉirkaŭaĵo". Post riĉa kultura programo kaj prelego foriris la ĉeestantoj al E.-arbo kaj memorŝtono honorigi ĝin per bukedo. Post komuna fotografado ni vizitis ankaŭ Dr.Zamenhof-straton.

Bl.

PRAHA

Dum 9a de decembro festos 80 - jaran datrevenon la Esperantista Klubo en Praha. La jubileon ni rememoros jam 23an de oktobro en Kultura domo GONG. ĈIU,kiu volos partopreni.jam nun tuj eligu ĉe asocio aŭ rekte al adreso: Esperantský klub Praha, p. schr.1069,111 21 Praha 1. Al samaj adresoj vi povas sendi viajn salutkartojn kaj gratulojn.

PARDUBICE

Loka grupo de ĈEA aranĝis,kunlabore kun sekcio por porpaca agado kaj kunlaboro kun MEM, kunvenon de pacdefendantoj en Kultura Domo Dukla. Ĉeestis pli ol 130 da personoj inter ili reprezentantoj de porpaca movado el Aŭtrio,Belgio. DDR,YU,FRG,Hungario kaj Francio. La programo estis altnivela dediĉita al nuntempaj problemoj de la mondo kaj batalo kontraŭ la produkto de la atom kaj neŭtron-armiloj . Esperantistoj denove dokumentis klare,ke ili staras forte por la paco kaj vivo sen streĉo .

Partoprenis kiel ĉefaj gastoj la prezidanto de MEM Dr.Pethes kaj sekretario de MEM W.Gilbert.

DUDEKO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO

Komunikas Inĝ. J. Werner

burgo - hrad, hradiště /ne zámek!/
digramo - spřežka /dvojice písmen vyjadřující jednu hlásku např. čes. ch = ĥ; esp. ch = ĉ, jh = ĵ atd./
insili /tr./ - silážovat /zem./
insilujo - silážní jáma /zem./
kastelo - zámek /budova, šlechtické sídlo, v Evropě se vyvinul ze středověkého hradu/
klupo - vratidlo na závitové čelisti
nutono - newton /N/ /jednotka síly/
pinjono - pastorek /stroj./
radioskopia aparato - rentgen /přístroj/
tanĝa, tanĝanta - tangenciální
teleskopa amortizilo, skusorbilo - tlumič pérování /aut./
valva baskulo - ventilové vahadlo /aut./
ŝaltilo - vypínač /spíná a vypíná jmenovité hodnoty el.prudu a napětí/
komutilo - přepínač /umožňuje připojení nového prvku do pův.soustavy/
regkomutilo - řadič, kontrolér /přepínač pro operace v předepsaném sledu/
konektiloj - spínače /= vypínače a přepínače/
konektoro - konektor
kontakto - kontakt, dotyk /styk jako děj/
kontaktilo - kontakt, dotek /zařízení/
kontaktoro - stykač /spíná a vypíná na dálku/

# KRONIKO

Post longjara grava malsano mortis la 16-an de aprilo 1982 en la aĝo de 68 jaroj s-anino Božena P u m p r o v á, edzino de la neforgesebla d-ro Tomáš Pumpr.Honoron al ŝia memoro.

La 7-an de majo 1982 pasis 40 jaroj depost la ekzekuto de lernejdirektoro kaj fervora esperantisto Jaroslav N o v o b i l s k ý en Mauthausen. Honoron al lia porliberiga laboro kaj vivofero. Barbareco de la faŝismo estu neniam forgesata.

- - -

Åke H o l m k v i s t, nia sincera amiko kaj ĉiujara vizitanto de nia lando, en Stokholmo antaŭ nelonge festis sian 70 -jariĝon! Salutojn sendas,sanon kaj bonfarton deziras liaj multaj geamikoj.

-jelĉ-

PRI LI ...
Tute kaŝe. ĉar Li estis forte kontraŭ, ni enŝovis tiun ĉi malgrandan informon,pli malpli privatan,pri LIA GRANDA FESTO. Neniu diras. ke LI jam festas tian vivjubileon. Per koro kaj vigleco kiel junulo per agado kiel vera sciencisto,konstante bonhumora preparite rakonti en kiuajn situacio trafan bonan anekdoton. Jes tio estas LI - nia kara prezidanto Dr.Jermář,kiu festis 10.7.1982 sian naskiĝtagon. Do miaj/niaj/ gratulojn multe da sano.kompreno por ni kaj multe da novaj sukcesoj en ĉiuj direktoj.....!!

- ký́z -

## KORESPONDI DEZIRAS ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kĉs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Letervespero. Okaze de la fondiĝa datreveno de GDR /07-10/ Leipziga Laborrondo Esperanto aranĝos letervesperon. Ni petas niajn eksterlandajn geamikojn sendi al ni salutkartojn, leterojn kaj materialojn por ekspozicio. Certa respondo! LAK ESPERANTO, DDR-7010 LEIPZIG, PF 713.

LENKA MASAŘÍKOVÁ - 14 jaraĝa knabino deziras korespondi tutmonde. Skribu al : CS-788 11 Loučná n/D n-ro 77 .

ESPERANTO KLUBO EN M O S K V O serĉas klubojn en nia lando por ligi ĝemelajn kontaktojn. Ili ankaŭ volonte korespondos kun unuopuloj. Prefeanoj cefe estas petataj por respondi al adreso : ANATOLIJ SUZNAKIN, Ferganskaja n-ro 11-1, kv. 150, 109444 MOSKVA.

15-jara Jana LUKÁČOVÁ kaj 11-jara Josef LUKÁČ ul.Svobody 384 , CS 955 03 TOPOLČANY deziras korespondi tutmonde kun samaĝuloj.

29-jara oficisto dez.korespondi tutmonde pri ĉ.t.kaj ŝanĝi BK: Vladimir GIRBA, ul.28 ijunja 49-1 FLOREŜTY, SU-279800

KATUNIN Gennadij /37-j./interŝanĝos BK kaj PM pri pentroarto.
KATUNINA Natali /10-j./interŝanĝos kalendaretojn.
adreso de ambaŭ: USSR 630064 NOVOSIBIRSK - 64,str.Vatutina ap.4.

12 jaraj gelernantoj:
Khuong Cong Thai /lernanto/
Cao Yuan Ha /lernanto/
Nguyen Trac Phu /lernanto/
Pham Tuanh /lernantino/
LU'Uthanh Tam /lernantino/
Tran Phuong Mai /lernantino/
Dotuiet Anh /lernantino/
Nguyen To Uyen /lernantino
Hoang Thu Thuy /lernantino/
Nguyen Thuc Oanh /lernantino/
Tran Hong Mai /lernantino/
Tram Phuong Mai /lernantino/
Hoang Thithanh Thui /lernantino
Nguyen Hong Hanh /lernantino/
Esp.kurso ĉe la lernejo Ngo Si Lien, str.Ham Long HANOJO - VSR

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu.Jilská 10. 110 01 Praha 1. vydávaný pro potřebů členů svazu. Vychází 6x ročně Odpovědným redaktorem Zdenko Křimský. Grafická úprava Milan Labašta. Fotografie archiv. Křimský.HEA . Kresby Pavel Rak. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 4.6.1982. Dohledecí pošta Praha 07. snížený poplatek ze poštovné povolen ředitelstvím pošt Praha pod č. jed. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

STARTO: presorgeno de ĈEA. Jilská 10. 110 01 Praha 1. Aperas 6 foje jare. jarabono 24.-Kčs aŭ 10.50 gld. Mendi eblas ĉe niaj perantoj aŭ ĉe UEA same kiel kotizojn por anoncoj. Respondа redaktoro estas Z.Křimský. desegnoj P. Rak. grafika aranĝo M. Labašta. Transdonita al presejo 4.6.1982.




BALNEA
PRAHA

# HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi sentas ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon — kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

**ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ**

**— oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro —**


KARLOVY VARY - FRANTIŠKOVY LÁZNĚ - MARIÁNSKÉ LÁZNĚ - JÁCHYMOV - TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY - JANSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ - JESENÍK
LUHAČOVICE - TEPLICE NAD BEČVOU

**BALNEA** * Reprezentanto de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj kurac-fontoj,
PAŘÍŽSKÁ TŘÍDA 11, 110 01 PRAHA 1, ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215

# nákladní automobily AVIA

podvozky
valníky
účelové nástavby

▪ moderní koncepce a konstrukce ▪ elegantní vzhled ▪ hospodárný provoz ▪ účelovost



PRAHA 9 - LETŇANY
závody - Brno, Ivančice, Žilina